

# LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung, LK.; Robert Kreuz, LK.; Inĝ R. Orenge, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I \* N-RO 21

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

DECEMBRO 1933

## Survoje al Konsilanta Gramatiko.

Redaktanto: Teo Jung.

Materialon por ĉi tiu rubriko oni direktu al s-ro Teo Jung, Brüsseler Strasse 94, Köln, Germ.; ĉiun ceteran materialon destinitan per „Lingva Kritiko“ al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

### Gramatikaj demandoj.

#### 71. Dusenca frazo.

En junia buleteno de Federacio Esperantista de Lancashire & Cheshire mi trovis jenan „Korespondado“-noton:

F. W. S. skribas, ke la frazo „Kio fariĝas akvo per varmigo?“ ŝajnas al li dusenca, ĉar la respondo povas esti aŭ „vaporo“ aŭ „glacio“, kaj deziras scii, kiel plej bonstile eviti la dusencecon.

En frazoj, kie miskompreno povus rezulti pro du nominativoj, mi trovas pli simple meti la subjekton antaŭ la verbon (?), kaj se tio povas helpi, iun prepozician frazeron en la frazo apud la vorton, kies senco ĝi modifas. Mi sugestas, ke la jenaj frazoj pli trafe postulas la cititajn respondojn:

(a) Kio akvo fariĝas per varmigo?

— Vaporo.

(b) Kio per varmigo fariĝas akvo?

— Glacio.

Mi tamen opinias, ke per tia simplega „arango“ la dusenceco ne estas forigata. Ĉu ne jenaj formoj estas pli klaraj?:

(c) Kio fariĝas el akvo per varmigo?

(resp.: Vaporo)

(d) Kio akviĝas (iĝas akvo) per varmigo?

(resp.: Glacio). (G.E.)

#### 72. Trans aŭ super?

Malnova esperantisto (kaj mi havas diferencon opinion pri la frazo: „La knaboj jetas ŝtonojn trans tegmenton“). Li asertas, ke anstataŭ „trans“ povus esti ankaŭ „super“. Mi neas tion dirante, ke ĉe „super“ la ŝtonoj ne estas jetataj al la alia flanko, sed al (eble imagata) punkto, kiu havas sub si la tegmenton. Ĉu mi pravas? (B.K.)

#### 73. Prepozicioj kiel konjunkcioj: laŭ.

Ĉu estas ĝusta la uzo de „laŭ“, kiel oni trovas ĝin ĉe hispanaj esperantistoj, ekz.: „Laŭ diris la kuracisto?“ Mi evidente uzadas la prepozicion „laŭ“ same kiel ĝenerale oni aplikas „dum“, ekz.: „Dum mi legis...“. Ĉu la hispana maniero estas pravigebla kaj rekomendinda? (B.K.)

#### 74. Milion — miliard.

#### 75. Tia aŭ tiel?

Pri la sekvantaj gramatikaj formoj mi diskutis kun malnova samideano. Demando: „La konstruelspezoj ne superu la sumon de 13 milion svisaj frankoj.“ Laŭ mi, devas esti: „La konstruelspezoj ne superu la su-

mon de 13 milionoj da svisaj frankoj.“ Laŭ ti, milion estas kardinala numeralo; laŭ mi, milion estas substantivo kaj ĝi meniam povas esti uzata en la formo „milion“. — Alia: „Ne estas mirinda afero, ke tia grava kaj granda institucio ne funkcias jam en la unuaj jaroj (kontentige por ĉiuj)“, aŭ: „Ne estas mirinda afero, ke tiel grava kaj granda institucio ne funkcias...“ Kiu esprimo estas la ĝusta? (J. Cs.)

#### 76. Ne konjekti.

Ĉu oni povas „ne konjekti, ke io estas“? Mi legis en Vladyka, Mi en li: „Cetere mi ne konjektas, ke ŝi scias pri io.“ (Pg. 132.) (O.M.)

#### 77. Oni kun pluralo.

En „Vladyka, Mi en li“, mi trovis la jenajn frazojn:

... oni estus flegintaj ĝin. (Pg. 15.)

Se iu fremda persono estus farinta ĝin, oni estus rimarkintaj tion. (Pg. 71.)

Al mi ŝajnas, ke „oni“ estas singulara pronomo, kaj ne plurala. (O.M.)

## Respondoj.

#### 62. Kies kaj po.

La demando estas nekvara kaj la respondo same, sed kun la diferenco, ke la lasta povas facile kaŭzi eraron „precipe je komencantoj“!

Certe, ĉiuj 4 frazoj estas korektaj laŭ gramatiko, sed ili estas ne samsignifaj, kaj ŝajnas al mi, ke pri tio temas la kerno de la demando. Samsignifaj estas la frazoj 1, 2 kaj 4, tamen n-ro 2 enhavas duoblan atentigon, nome „ĉiu“ kaj „po“, kontraŭe frazo 3 estas dusenca, ĉar povas esti, ke la etaĝo — laŭ tiu frazo — enhavas aŭ komune ses ĉambrojn, aŭ po. Do frazo 2 estas tro klarigita, kontraŭe en frazo 3 mankas precizeco. (H.H.)

#### 64. Du demandvortoj en sama frazo.

Ne! La frazoj „li klarigis, kiu kion devas fari“ kaj „li klarigis, kion ĉiu devas fari“ estas diverssencaj. La esprimo ja tute ne volas diri, ke „ĉiu devas tion fari“, kion signifas la frazo: „kion ĉiu devas fari“. La hungaran esprimmetodon, kiu estas kvankam nekutima sed tamen tre preciza kaj mallonga, oni povas alie esprimi jene: Li klarigas, „kio devas fari ion kaj kion“ aŭ „kio estas farenda kaj de kiu“. (H.H.)

Rim. de red.: S-ano H. H. estas prava; sed kutime (en 95 el 100 okazoj) estas koncernata ĉiu. Ni opinias, ke tian esprimmanieron oni preferu evitu.

#### 71. Dusenca frazo.

S-ano G. E. jam mem donis la respondon. Ni opinias, ke frazoj c kaj d estas la plej

klaraj, sed ke ankaŭ a kaj b estas sufiĉe klaraj. En la plej multaj kazoj ankaŭ la kunteksto ja klarigas la senco.

#### 72. Trans aŭ super.

Ni konsentas kun la opinio de B. K. Pli klare montras la ĝustecon de lia opinio ekzemplo pri „birdo“ anstataŭ „ŝtonoj“, ĉar ŝtono estas objekto, kiu ne povas resti ŝvebanta en la aero: La birdo flugis trans la tegmenton (ĝi atingis la transan flankon); la birdo flugis super la tegmenton (ĝi restas ŝvebanta super la tegmento).

#### 73. Prepozicioj kiel konjunkcioj: laŭ.

Kvankam oni povas eventuale pravigi la konjunkcian uzadon de „laŭ“, sed ĝi ŝajnas al mi malrekomendinda; ĉar tiukaze ni devus permesi ankaŭ la konjunkcian uzadon de aliaj prepozicioj, ekz.: Antaŭ mi eliris, mi adiaŭis; post la letero estis ekspedita, mi konstatis, ke mi forgesis aŭfranki ĝin; per ti estis kuraga, li sukcesis; pro la hundo bojis, la ŝtelisto estis rimarkata, ktp. Ĉu la esperantistaro dezirus enkonduki tiujn formojn? Ĝis nun oni nur povas diri: antaŭ ol (antaŭ kiam), post kiam, per tio ke, pro tio ke, ktp. Nur du prepozicioj (dum kaj ĝis) estas ĝenerale akceptitaj ankaŭ kiel konjunkcioj; sed ekzistas la tendenco, eĉ ĉi ti kombini kun ke aŭ kiam (dum ke, dum kiam, ĝis kiam).

#### 74. Milion — miliard.

Ĝis nun, s-ro J. Cs. estas prava. Sed estas vere ke, nombrante aŭ kalkulante, la substantiveco de la numeraloj milion(o) kaj miliard(o) ofte prezentas gravan ĝenon. Ni salutis, se la Akademio foje esprimus sin favore al enkonduko de milion kaj miliard (same bilion, biliard, trilion ktp.) ankaŭ kiel kardinalaj numeraloj.

#### 75. Tia aŭ tiel?

Ambaŭ esprimoj estas korektaj. Nur la senco estas iom diferenca. „Tia“ rilatas al la substantiva „institucio“ („tia institucio grava kaj granda ne funkcias...“), kaj „tiel“ rilatas al la adjektivoj „grava kaj granda“ („institucio tiel grava kaj granda ne funkcias...“).

#### 76. Ne konjekti.

La citita frazo gramatike estas neriproĉebla. Logike ĝi ŝajnas ne tute korekta. Devus esti: Cetere mikonjektas, ke ŝi ne scias pri io. Sed tiel severan logikon neniu postulas. Alie ni devus ankaŭ kritiki frazojn kiel: Ŝi scias pri menio, mi aŭdis nenion, menu estis en la salono (logikege: ŝi ne scias pri io, mi ne aŭdis ion, ne estis ĉi en la salono). — Simile kiel pri „konjekti“ estas ankaŭ pri „supozi, opini“ ktp.

#### 77. Oni kun pluralo.

Jes, „oni“ estas singulara pronomo, ankaŭ kiam ĝi signifas plurajn aŭ eĉ multajn personojn. Tamen ĝian pluralan uzadon ni ne konsideras nepre eraro; sed ĝi ŝajnas al ni evitinda.

# Bibliaj esprimoj en Esperanto.

De Joh. Hartog.

En sia prelego dum la 25-a Universala Kongreso de Esperanto en Kolonjo, Prof. W. E. Collinson pruvis, ke multaj bild-esprimoj enpenetras en la lingvojn interalie el la fonto de la Biblio (Lingva Kritiko, n-ro 18/19; julio-aŭgusto 1933; pĝ. 4).

Efektive, estas konate, ke la nacilingvaj tradukoj de la Biblio estis por multaj lingvoj la ĉefa bazo, sur kiu ili evoluis kaj el kies lingvo-provizio la maciaj lingvoj transprenis multajn esprimojn. Oni do ne povas miri, ke D-ro L. L. Zamenhof, kiu tiel forte akcentadis la egalecon de Esperanto al ĉiu ajn nacia lingvo, jam tre frue entreprenis la tradukon de la Biblio. Ĉi tiujn motivojn ni povas legi en lia „Antaŭparolo al la Genezo“ (Originala Verkaro, I, 14):

„Por la plimulto de la nuntempaj kulturaj lingvoj la Biblio estis la ĉefa bazo, sur kiu la lingvoj literaturigis kaj disvolvigis; tial ankaŭ por nia lingvo sendube estos tre grave, se ĝi posedos en si en plena tuteco tiun bazon kun ĝiaj multaj vortoj kaj esprimoj, kiuj fariĝis elementa necesajo por ĉiu nuntempa kultura lingvo.“

Atentu precipe ĉi-lastan: kun ĝiaj multaj vortoj kaj esprimoj!

Precipe inter la esperantistoj nuntempaj estas multaj, kiuj nur malbone aŭ tute ne konas la Biblion. Komence ja nia lingvo ĉefe disvastiĝis en Eŭropo, kies loĝantoj grandparte estis kristanoj kaj sekve pli-malpli konas la Biblion. Kaj tiuj, kiuj ne estas kristanoj, tamen dum la ĉiutaga vivo tre ofte interkontaktiĝas kun kristanoj, tiel ke ankaŭ ili scias, kio estas la Biblio. Nun tamen, en 1933, la lingvo jam „flugis de loko al loko“ kaj inter la samideanoj estas multaj anoj de aliaj religioj, grandparte ekster-eŭropaj (islamo, budhismo ktp.). Por tiuj samideanoj mi volas per kelkaj vortoj klarigi la signifon de la Biblio, por ke ankaŭ ili povu pli bone kompreni la bildesprimojn, el ĝi prenitajn.

La vorto „biblio“ estas derivita de la greka „biblia“, kiu signifas „libroj“. Ĝi do estas neŭtrala nomo, sed deŝt S. Johano

Chrysostomus (pron. Ĥrisostomus; mortis en 407) oni uzas la nomon nur por indiki la sanktan libron de la kristanoj el ĉiuj eklezi-anaroj, kiuj sin nomas kristanaj (katolikoj, protestantoj, anglikanoj, ortodoksuloj, luteranoj kaj multaj aliaj sektoj).

La definitivajn listoj de ĉiuj enhavataj libroj (la vorto ja estas pluralo) oni fiksis en la koncilio de Hippo (393), sed kompreneble antaŭ tiu tempo jam ekzistis multaj biblioj (ankaŭ pluraj tradukoj), kies enhavata libroro ne ĉiam estis tute la sama. Tiun samecon oni fiksis en la supre nomita koncilio de Hippo. Pri tia malnova biblio oni povas ekzemple legi kelkajn detalojn en artikolo de sinjoro Tados Migalli pri ekzemplero de la Biblio el la 3-a jarcento (vidu en Heroldo n-ro 741, pĝ. 5).

La ĉefa traduko, sur kiu baziĝas multaj nacilingvaj tradukoj (ne la Esperanto-traduko), estas tiu de S. Hieronymus (pron. Ĥieronimus), kiu donis al ni ti. n. „Vulgaton“ (384—396). La Vulgato, latina teksto, nun estas la oficiala traduko de la Katolika Eklezio. Tamen en ĝi la influo de pli fruaj tradukoj estas ankoraŭ konstatabla; kelkloke la pli fruaj tradukoj iom malligustigas la tekston.

La Malnova Testamento originale estas verkita en la hebrea lingvo kaj la Nova Testamento preskaŭ tute en la greka lingvo (escepte de la evangelio laŭ S. Mateo). En la nuna tempo oni povas havigi al si tradukojn en preskaŭ ĉiuj lingvoj. Pri la historio de la Esperanto-traduko mi okazze skribos en Heroldo.

Prof. Collinson jam donis kelkajn ekzemplojn de bibliaj esprimoj, kiuj fariĝis komun-eŭropaj, kaj kiuj per Esperanto eble fariĝos tutmondaj.

Unue mi volas doni la trovlokojn kaj klarigi pri tiuj de Prof. Collinson cititaj esprimoj. Sen plia komentario ili eble ne estas kompreneblaj por la tutmondo.

Oni uzas tiajn bibliajn esprimojn en preskaŭ ĉiuj naturaj lingvoj, kial do oni ne uzu ĉiujn en Esperanto?

(Daŭrigota.)

ĉiuj kulpoj : ĉiuj miaj kulpoj (35, 1)  
do mi : do mi (37, 33)  
mirindaj : mirinda (39, 26)  
hariĝis do : hariĝis de la (65, 17)  
mi — ambaŭ : mi — ni ambaŭ (73, 31)  
pantomino : pantomimo (86, 15)  
mortiginto : mortiginton (100, 17)  
la : al (110, 23)  
kalkisto : bakisto (124, 10)  
l : la (145, 26)  
lo : ol (146, 20)  
enhaon : enhavon (158, 9)  
m : mi (161, 35); (165, 27)  
liaakajj : kaj aliaj (174, 14)

Krom tiuj preseraroj, mi notis la sekvantajn diferencojn de interpunkcio:

103, 33: je la fino de ŭ verso mankas punkto-komo.

104, 3: anstataŭ dupunktoj, koma.

131, 13: post „preĝas“ mankas punkto.

132, 2: la koma post „ĉiel“ devas esti anstataŭigita de apostrofo.

173, 3: aldonu koman inter „palaj“ kaj „mutaj“.

168, 21: je la fino de la verso, forigu la ek-kri-signon.

En la 1-a eldono troviĝas deko da vortoj presitaj mallidense (= kursive); mi ne opinias utila citi ilin.

Fine, unu preseraro, ekzistanta en la 1-a eldono, restis ankaŭ en la sekvantaj: la ritmo postulas, ke oni legu „ĉi“ anstataŭ „ĉio“ en 154, 22.

## II. — Variantoj.

Laŭ la kontraktoj starigitaj inter Hachette kaj L. de Beaufront, mi scias, ke tiu havis la rajton laŭplaĉe korekti ĉian verkon de la „Aprobita Kolekto“. Ni devas do serĉi, pri ĉiu varianto, ĉu ĝin faris Zamenhof aŭ De Beaufront. Oni unuavide povus supozi, ke De Beaufront enkondukis nur variantojn aprobitajn de Zamenhof. Sed du faktaj hezitiĝas la kritikanton: unue, almenaŭ du el tiuj variantoj estas kontraŭsencoj, kaj estas tre neverŝajne, ke Zamenhof mem kulpis ilin en 2-a eldono, doninte ĝustan tradukon en la 1-a; la 1-a akto de Hamleto estis represita en la Fundamenta Krestomatio, kiu aperis en junio 1903, do preskaŭ unu jaron post la „nova eldono“ de Hamleto: nu, en la Krestomatio, la 1-a akto enhavas nek la variantojn, nek la preserarojn de la „nova“ eldono. Kaj tio devas kuriozan problemon: oni havos la solvon, nur se oni memoras, ke dum la tuta vintro 1902—1903 C. Bourlet batalis por rompi la kontrakton drakonan, kiu ligis Zamenhof, kaj sukcesis en la printempo de 1903. La Krestomatio estis do presita ekster la kontrolo de De Beaufront, sub la sola gvido de C. Bourlet, kaj tiu ĉi samtempe zorgis pri la korekto de la teksto kaj respektis la stilon de Zamenhof kun plia skrupulo ol De Beaufront. Rezultis do tiuj privataj aranĝoj oni konstatas per tio, ke De Beaufront, en sia gazeto La Esperantisto, anoncis la eldonon de Hamleto siatempe kaj kun laŭda komento, sed la eldonon de la Krestomatio nur en decembro 1903 kaj sen ja ajn komento.

Oni tamen ne devas konkludi de tiuj rimarkoj, ke ĉiuj korektoj estis faritaj de De Beaufront: unue, ĉar ni havas en la Krestomatio nur la 1-an akton, kaj pluraj variantoj aperas nur en la sekvantaj; due, ĉar en la sekvantaj verkoj de Zamenhof ni povas konstati, ke li evitas kelkajn el tiuj korektitaj formoj. Oni povas do supozi, ke Zamenhof mem iniciatis tiujn korektojn, aŭ cedis al la kritikoj de De Beaufront. Mi klasigos do la sekvantaj rimarkojn en du kategoriojn: la variantoj, kiujn oni verŝajne povas atribui

## Kritika „aparato“ de la Zamenhofa Hamleto.

La tradukon de Hamleto Zamenhof verkis verŝajne dum la jaro 1893 kaj publikigis en 1894 en „Nurnbergo, presejo de W. Tümmel“. Ĝi portas la numeron 71 de la „Biblioteko de la Lingva Internacia“. Kompleta titolo estas: „Hamleto / Reĝido De Danujo / Tragedio En Kvin Aktoj / De / V. Sekspir. / Tradukis L. Zamenhof.“ La libro enhavas 136 paĝojn, bele presitajn sur bona papero; formato 13,4×21 cm.

La venko estis reeldonita en 1902 en „Paris, Librairie Hachette et Cie“. Ĝi apartenas tiam al la „Kolekto Esperanta aprobita de D<sup>o</sup> Zamenhof“. Kompleta titolo estas: „W. Shakespeare / Hamleto / Reĝido De Danujo / Tragedio En Kvin Aktoj / Tradukis / L. Zamenhof / Nova Eldono.“ Tiu nova eldono enhavas 176 paĝojn, formato 11,5×17,6. Ĝi estis sensange represita du la sama firmo, sub la ĝenerala titolo, ekde 1905: „Esperanto / Verkaro de D<sup>o</sup> Zamenhof“. En la sekvantaj notoj mi uzos ekzempleron de la Kvina Eldono (1909)

Tiu „nova“ eldono estas multe malpli ko-

rekta ol la unua. Aliflanke, oni konstatas inter ambaŭ kelkajn variantojn, kies origino ni devas serĉi. La sekvanta studo estas do dividita en du partojn: 1-e preseraroj; 2-e variantoj. La citaĵoj estas faritaj laŭ simpla maniero: mi citas unue la tekston de la 5-a eldono, poste la tekston de la 1-a, kaj mi aldonas interkrampe la lokon de la citaĵo per du ciferoj, el kiuj la unua montras la paĝon, la dua la linion de la diskutajo en la 5-a eldono. Formulo kiel „men:mem (30, 25)“ signifas do, ke la 5-a eldono prezentas, je la 25-a linio de la paĝo 30, la vorton men, dum la 1-a prezentis „mem“. Por la nombrado de la linioj, mi kalkulis, kiel unuon, ĉiun eĉ nur parte presitan linion (do, inkluzive de la nomoj de la drampersonoj).

### I. — Preseraroj.

strangaj teruraj : strangaj kaj teruraj (7, 10)

reĝo : reĝa (12, 2)

Mo : Ne (12, 17)

al patro : al la patro (18, 6)

men : mem (30, 25)

al Zamenhof kaj tiuj, kiuj ŝajnas deveni de De Beaufront.

### A. — Korektoj atribueblaj al Zamenhof.

**petegas : prijuras** (4, 20 — 60, 6). Kvankam „prijuras“ estas konservita en la Krestomatio, je la unua citaĵo, mi opinias, ke Zamenhof mem intencis korekti ĝin per „petegi“, ĉar, laŭ miaj konoj, de 1900 li ne plu uzas „prijuri“, tro sklavan tradukon de la germana: beschwören; kaj en la Germana—Esperanta Vortaro (1905) ĝi tradukas tiun verbon per „petegi“.

**nudpiede : nudapede** (68, 11). La fakto, ke „ped“ ne ekzistas en Esperanto, sufiĉe pravas, ke Zamenhof mem korektis sian senatentaĵon.

**troviĝas : sin trovas** (73, 35 — 139, 11)

**troviĝis : sin trovos** (83, 11)

**troviĝis : sin trovis** (97, 26)

**troviĝi : sin trovi** (118, 30)

**troviĝas : vin trovas** (148, 6)

**troviĝas : min trovas** (148, 9)

**troviĝas sin : trovas sin** (81, 28).

Ĉar en ĉiuj samtempaj aŭ postaj verkoj de Zamenhof oni trovas nur „troviĝ-“ anstataŭ „sin trov-“, oni povas konkludi je la Zamenhofeco de la korekto. La lasta citaĵo klariĝas per tio ke, anstataŭginte „trovas“ per „troviĝas“, la korektanto forgesis forstireki la pronomon „sin“, eble ĉar ĝi troviĝis eksterkute post la verbo; tiu forgeso igis la tekston nekomprenibla.

**Poluĵon : Polujo** (120, 6). Post „kontraŭ“ Zamenhof pluriĵe uzis la akuzativon por montri ideon de mallamrikeco, atako; krome tie ĉi enestas ideo pri almovo.

**sia : sja** (163, 30). La uzo de la refleksiva pronomo por la 1-a aŭ 2-a persono estas slavismo, kiun Zamenhof forigis preskaŭ ĉie, kie li kulpis ĝin. En la poemo „En sonĝo“ la 4-a verso tekstis en 1887 „tenante sin koro ĉe koro“, sed en la Fundamenta Krestomatio (326, 17) „tenante nin koro ĉe koro“. Ŝajnas do probable, ke ankaŭ tie li korektis. D-ro W. Lippman rimarkigas, en sia Raporto pri la Refleksiva Pronomo (Kongreso 1926), ke Zamenhof ĉiam similan ekzemplon nekorektitan (155, 4): „aŭ disŝiri sin“ (= vin); sed pro la uzo de pluraj sinsekvaj infinitivoj, la pronomo ne tiris versajne ĉian atenton.

**leviĝi : sin levi** (172, 11). Pro la sama kaŭzo ol en la antaŭa rimarko, Zamenhof ne estus lasinta „sin“, uzitan pri la 1-a persono. Krome en la samtempaj aŭ postaj verkoj, li uzas „leviĝ-“ anstataŭ „sin lev-“. Komparu supre, pri „troviĝ-“.

### B. — Korektoj atribueblaj al De Beaufront.

**tempo : templo** (22, 17). La tekstoj angla „this temple“ kaj germana „dieser Tempel“ montras klare, ke la unua traduko estis ĝusta. La korektinto ne komprenis la komparon inter la korpo kaj templo (eble ĉar Zamenhof ne tradukis la „this — dieser“), kaj supozis, ke temas pri la pado de la tempo. Ĉar tiu lasta kompreno ne kontraŭstaras la sencon de la teksto, estas probable, ke oni devas rigardi la ŝanĝon korekto kaj ne simpla preseraro.

**fingiĝo : fino** (58, 8). La korekto de konciza kaj konversacia formo en pli longan kaj logikan ŝajnas aparteni al De Beaufront, kies spirito neniam ŝatis la flekseblecon kaj movbertecon en la lingvaj aferoj.

**ŝi : ŝi** (58, 11). La sekigo de la Fortuno,

kiel ino, ekzistas jam en la angla kaj germanaj tekstoj; en la esperanta mem, kelkaj linioj supre, oni legas, ke „la feŝĉo estas publika virino“, kio estas ankaŭ seksgo de abstrakta ideo. Oni povas do pensi, ke Zamenhof, uzinte unue pro gramatika skrupulo la neŭtran pronomon, poste, por faciligo kaj klarigo de la kompreno, korektis per la ina. Tamen ŝajnas al mi, ke estas pli da ŝancoj, ke la sekso de „Fortune“ en la franca kondukis De Beaufront al tiu korekto.

**plu : jam** (67, 7 — 75, 30 — 76, 29 — 88, 27 — 102, 30 — 104, 31 — 134, 2 — 136, 21 — 140, 30 — 141, 21 — 172, 11). En ĉiuj tiuj kazoj, jam (aŭ plu) estas uzita kun negacio. Tiel radikala korekto povas veni nur de De Beaufront, ĉar Zamenhof poste ofte ankoraŭ uzis „jam . . . ne . . .“. Sed ni devas rimarki, ke de tiu momento, lia ankaŭ uzis de tempo al tempo „plu . . . ne . . .“ pli ofte, mia opinio, ol li faris antaŭe. Ĉu la korekto de De Beaufront instigis lin al tio?

**juĝis : jugis** (105, 3). La angla teksto parolas nur pri sklavigo, servutigo; nur la germana diras „unterjocht“ (subjuĝis). La teksto kun „juĝis“ estas apenaŭ komprenibla, kaj mi inklinus rigardi tion preseraro; se ne, estus evidente korekto de iu alia ol Zamenhof, do De Beaufront.

**sia : sja** (106, 27). Laŭ la uzo de Zamenhof, bone klarigita de W. Lippman en la supre aludita Kongresa Raporto, oni devas konsideri „en malfacila batalado kun sia propra kompo“, kiel aparta ero de frazo (= dum ŝi batalas kun sia . . .) kaj la uzo de la refleksiva pronomo estas bonstila. Aliflanke, laŭ la reguloj montritaj de De Beaufront en la „Compendiaire sur la Grammaire de l'Esperanto“, la pronomo „sia“ devas ĉiam referendi al la gramatika subjekto de la propozicio: oni komprenas do, ke li korektis tie ĉi la uzon de Zamenhof.

**pendigilo : pendigo** (145/2, 5, 8, 9). De Beaufront opiniis versajne „pendigo“ malfacila vorto, kaj efektive ĝi devus havi la formon „pendigit-ingo“ por esti logika; krome, ĝi signifus eĉ nur la snuron, ne la trabon. Li sekve donas nur „pendigilo“ en la „Vocabulaire Français—Esperanto“, de Cart, Bourlet kaj De Beaufront (1902), sub „potence“. Male Zamenhof ĉiam preferis la formon „pendigo“, eble pro ĝia koncizo kaj sono: li donas ĝin en sia „Wörterbuch Deutsch—Esperanto“ (1905) sub „Gallen“, kaj uzas ĝin ankoraŭ en „La Rabiŝtoj“ (1908).

Mi provis, en la supraj hipotezoj, atingi plej altan gradon de probableco; sed oni ne devas forgesi, ke temas nur pri hipotezoj kaj probableco. Kaj mi ne volas, finante tiun sian, pretenas malklari versajnan, sed tre ĉlan tamen eventualaĵon: ĉiuj tiuj korektoj apartenas eble al De Beaufront. Atentinda fakto estas, ke Zamenhof korektis siajn verkojn nur malofte, kaj ŝajne bedaŭre; en la Krestomatio, li reprecis malmovajn tekstojn sensamige, kvankam ili ne plu respondas al lia tiama stilo. Ĉu pro historia kaj lingva skrupulo, ĉu pro ja juda respekto al la skribaĵo kaj presitaĵo, ĉu simple pro manko da tempo — li ne ŝatis aliigi publikigitan tekston. Eble ankaŭ „Hamleton“ li intencis reeldoni kun la sama nevarieco ol la Krestomatio: nur De Beaufront respondus pri la ŝanĝo, el kiuj cetere malmultaj estis dezirindaj.

G. Waringhien.

## Konvinki — persvadi.

Flanke de la oficiala radiklo konvink', ekzistas jam en Vortaro de Kabe, kaj eble laŭ ĉi da modelo (konvinkar kaj persuadar jam troviĝas en Dictionnaire international-français de 1908) la radiklo persvad'. Jen la difinoj de Kabe:

**Konvinki**. Igi iun kredi, opini per sufiĉaj pruvoj aŭ argumentoj: „Ne facile estas konvinki homan obstinon“.

**Persvadi**. Alkonduki iun al decido, ke li faru ion: „Longe oni persvadis lin, ke li ne edziĝu, sed vane.“

La signifo de la du vortoj estas tiel analoga, laŭ Grosjean-Maupin, ke en sia Dictionnaire complet français esp. li eĉ ne citas konvinki inter la eblaj tradukoj de persuader: Persuader (qc à qn), persvadi, kredigi (iun pri io) / (à qn de faire) persvadi, decidigi (iun ke li faru), alkonduki (iun al decido ke li faru).

Nur por traduki la frazojn Etre persuadé, se persuader que, s-ro Grosjean-Maupin citas esti konvinkita ke.

En Plena Vortaro de Esperanto la difino de konvinki estas la jena: „Fari per pruvoj aŭ rezonoj, ke iu akceptu ion kiel veran aŭ pravan“, dum la difino de persvadi estas tute malsama ol tiu de Kabe: „Sukcesj kredigi ion al iu“.

La du radikloj ekzistas en la latina kaj en la latinidaj lingvoj; plue en la angla. Sed la signifo ne estas tre klare distingibla.

Laŭ la etimologio, la latina verbo convincere, derivita de vincere „venki“, signifas „venke pravi, konfesiĝi“; persuadere, derivita de suadere „konsili“, signifas „sukcese konsili“: la unua ĉefe konsideras la konvinkaton, la dua la konvinkanton. Sed en la modernaj lingvoj, la signifnuancoj oscilas: por distingi la du vortojn (aŭ, pli ĝuste, vortseriojn) la vortaristoj akcentas ĉu la verecon kontraŭ la ŝajno, ĉu la kredigon kontraŭ la agigon, ĉu aliajn kriteriojn. Sub verbo persuade, la konata Concise Oxford Dictionary klarigas convince, kaj sub convince, firmly persuade.

En germana lingvo ekzistas la du sinonimoj überzeugen kaj überreden, kaj la germanaj vortaristoj, egalligante überreden kun persvadi, akcentas la karakteron de konvinko donita al iu per vortoj, paroladoj, bataladoj.

Sed mi prenu la distingon de la itala sinonimisto Tommaseo, mi hai convinto, ma non persuaso, kaj ĝian germanan tradukon: du hast mich überredet, aber nicht überzeugt. Itala verkisto emos traduki laŭ itala modelo: vi min konvinkis, sed ne persvadis, germana verkisto, kontraŭe, laŭ germana modelo: vi min persvadis, sed ne konvinkis.

Ĝis nun, la verkistoj uzis multe pli ofte konvinki, ĉar ĝi estas la sola oficiala vorto. Kaj mi persone kredas, ke la nuanco inter la du konceptosferoj estas tro malfacile difinebla, por ke ĝi pravigu la ĝeneralan enkondukon de persvadi.

Sed ĝuste nun la komparo kun aliaj lingvoj, ĉefe de neeŭropaj lingvoj, estus tre utila. Kiajn sinonimseriojn posedas la hungara, la ĉina, la japana lingvoj ktp.? Nur se tiuj serioj montrus paralelecon kun la latina kaj latinida sinonimserioj, kaj se oni povus precize difini gravan diferencigan nuancon, la ĝenerala enkonduko de la paro konvinki — persvadi, anstataŭ la mura konvinki, meritis rekomendon.

B. Migliorini.

# Esperanto restu facila.

De Emma L. Osmond.

Mi ĝojis legi la leteron de s-ro Dratwer en „Lingva Kritiko“. Kaj mi konsentas kun li, ke la enkonduko de novaj vortoj konfuzas la ordinaran leganton kaj precipe novajn lernantojn. Kelkaj verkoj havas tiom da novaj vortoj, ke la legado tedas same kiel legado de nacia verko enhavanta multajn aĥilingvaj vortojn aŭ frazojn. Ofte oni povis uzi jam pretan vorton aŭ radikon, kiu esprimas la ideon de la aŭtoro tiel bone kiel la nova vorto. Eĉ se kunmetita vorto ne esprimas ĉiun nuancon, ĝi donas pli-malpli pravan bildon de la ideo, sed tiaj novaj vortoj, kiel etoso, hisi, konekso, morna, svelta, donas nenian ideon al tiu, kiu ne konas pli ol unu lingvon, kaj vortoj kiel profanulo, renomo, povas eĉ doni malpravan ideon. Mi scias, ke naciaj lingvoj devas akcepti novajn vortojn por novaj ideoj, sed ili ne havas ĉarman eblecon fari vortojn el radikoj, kiel Esperanto havas.

Mi opinias, ke trudo de novaj vortoj laŭ persona inklino de verkistoj faros pli grandan efikon sur vendado de ties verkoj ol sur Esperanton. Mi ĉesis aĉeti verkojn de verkistoj, kiuj tiamaniere pekas, ĉar ili ĝenas min.

Mi ankaŭ legis la artikolon de s-ro Engholm pri „aoristo“; mi eĉ ne scias, kion aoristo signifas; do mi opinias, ke ordinario, uzanta Esperanton, estos dankema, se ĉiuj verkistoj sekvos la konsilon de s-ro Engholm, „konservi tiujn ecojn de Esperanto, kiuj estas plej gravaj al ĝi, en ĝia kvalito de internacia lingvo: facilecon kaj simplecon“.

Mi devas diri, ke „Al Toronto“ de s-ro Engholm kaj la traduko de la taglibro de Andrée estas tre ŝatataj pro tiaj ecoj, de miaj amikoj, kiuj legis ilin; ili estas legeblaj sen vortaro. Kaj tiajn verkojn ni bezonas por la plimulto de esperantistoj. Kontraŭe kiam mi legis „Tra sovaĝa Kamĉatko“, la novaj aŭ malĝuste uzataj vortoj ĝenis min.

Mi konsilas, ke verkistoj ofte studu la saman radikaron de Zamenhof kaj el ĝi aŭcible fabriku novajn vortojn kompreneblajn pro ilia radikdeveno, al tiuj kiuj neniam antaŭe vidis ilin. Mi almetas liston da vortoj el „Tra sovaĝa Kamĉatko“, kiuj mi devis klarigi al nespertaj amikoj. Mi scias, ke kelkaj vortoj jam estas permesataj, ekz. „tino“, sed por ordinara uzo mi opinias, ke oni povas uzi la pli kutiman vorton. Mi ne pretendas esti spertulo, sed la plimulto estas simila al mi, kaj verkistoj devas pripensini.

Jen la listo el „Tra sovaĝa Kamĉatko“:

li dek'aris (paĝoj 10, 15) = li diris  
hisis (17, 99) = surstangigis  
kondensita (18) = densigita  
ekspropriado (19) = alprenado  
gapis (22) rigardadis  
malfalse (25) = vere  
veterinaro (25) = bestkuracisto  
plagoj (26) = malhelpajoj  
ingredienoj (28) = materialoj  
nesolidara (28) = ?  
provianto (33, 102) — ?  
tino (35) = barelo  
snakomi (37) = ?  
surogato (53) = anstataŭo  
starti (58, 98) = ekiri  
deponis (58) = metis  
trakrozis (60) = transiros  
ignorante (94) = malatentante  
situanta (96, 107) = lokita

solventaj (97) = pagkapablaj  
eminentaj lokoj (97) = ?  
fluktuantaj (98) = ŝanĝemaj?  
spiti (100) = ?  
ofte el pluraj (102) = ofte el pli  
ŝpato (104) = ?  
spurojn (105) = postsignojn  
konsiderinde (107) = sufiĉe?  
tretas (108) = ?  
malobservi promeson (126) = neplenumi  
renomon (150) = famon.

Mi ne finis legi la libron.

Rim. de red. — S-ino Osmond estas prava, postulante ke la verkistoj uzu ne tro multajn neologismojn. Aliflanke, la listo el „Tra sovaĝa Kamĉatko“ preskaŭ ne enhavas neologismojn. Vortoj, kiel „plagoj, provianto, treti, renomo“ estas Zamenhofaj; „solidara, deponi, krozi, ignori, spiti, ŝpato“ estas oficialaj; „hisi“ estas fakterminoj; „starti“ konas ĉiu anglo el sia nacia lingvo; „snakomi“ estis metita inter citilojn kaj tuj poste klarigita = „konatuloj“ (pli korekte: konatoj); „ekspropriado, ingredienoj, surrogato, fluktuantaj, pluraj“ efektive ŝajnas esti uzitaj en neĝusta senco; „malobservi promeson“ estas eraro; „kondensita“ ne ĉiam estas samsignifa kun „densigita“, „gapis“ ne estas nur „rigardadis“, „tino“ ne estas „barelo“, „deponi“ havas pli specialan sencion ol „meti“, „trakrozi“ ne estas „transiri“. Kial verkisto ne uzu „deklari, malfalse, eminentaj lokoj, konsiderinde“? Prave rifuzante amasan enkondukadon de neologismoj, ni ne devas „elverŝi la infanon kun la banakovo“; alie ni ricevos specon de „Basic Esperanto“, en kiu ne ekzistas vortoj kiel „nokto, ekster, telefono, avo, vilaĝo, urbo, semajno, monato, jaro“, ĉar sufiĉos diri „maltago, malen, malproksimenparolilo, grandpatro, domaro, domarego, septagaro, lumperiodo, sunperiodo“ k. m. a.

Do, la ora mezo estas kaj restas preferinda.

T. J.

## Enmeto de vokalo pro bonsoneco kaj neenmeto.

Zamenhofaj ekzemploj.

{ skribotablo OV 170, FdE 63  
skribotablo Mar 4, 4, 4, 5  
skribotablon Mar 4  
preĝopupitro Rabe 33  
preĝupupitro Rabe 36  
preĝupupitroj Rabe 39  
signifoplenaj Bat 63  
signifplena Mar 89  
mondolingva OV 382  
mondlingva OV 441  
mondlingvanoj OV 462  
grandanombra Bat 44  
grandanbrana Rev 86  
grandanombre Psal 58  
grandnombra Rabe 9  
fratomortiga Rabi 131  
fratmontigo lfi 54, 61

{ Pentofaro Ham 99  
pentofaro Ham 99  
pentofari Ham 99  
pentofarema Rabi 8  
pentifare lfi 38

{ diosimila lfi 64  
Disimilaj (pro kio?) lfi 63

{ longatempe OV 248, LR 36, NOMB 64  
longtempaj OV 20

Naokazu Kawasaki, Osaka.

## LINGVA TRIBUNO

La konstruo de la lingva sistemo.

Cu mi rajtas sugesti kelkajn negravajn korektojn en la cetera interesa kaj studriĉa tezo de s-ro Penndorf: „La konstruo de la lingva sistemo“?

1. Cu „aŭ“ ne venis rekte el latina „aut“ (ne el franca, angla, itala, kiel asertite)?

2. „Almenaŭ“ ŝajne ne estis transformita el franca „au moins“, sed prenita rekte el la itala vorto samsignifa „almeno“.

3. Sufiksulo „il“ ŝajnas havi devenon tiom germanan, kiom latinidan. Vidu: ŝlosilo kaj germane: Schlüssell.

4. Sufiksulo „um“ havas sian parencon ne nur en la germana, sed ankaŭ en la angla: a. numpteen = dek-unu, t. e. nombro ĉirkaŭ dek, io nedifinita.

5. Kial estas „tute neeble“ derivi la sufiksulo „eg“ la greka „mega“? Vortoj kun signifo „granda“ en preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj enhavas literon „G“ (latine: magnus, gigans; france: grand, gros, large; angle: great, big, huge, large, gigantic, mighty; itale: grande; germane: gross. La tri mitologiaj gigantoj nomiĝis Og, Gog kaj Magog; la biblia giganto nomiĝis Goliath. Zamenhof do prenis el tiuj vortoj la solan komunan literon „G“ kaj metis antaŭ ĝin vokalon „e“ analogie al la parenca sufiksulo „et“.

Frian Price-Heywood, L. B. E. A.

Pri metaforoj.

En sia bela artikolo pri la metaforo (L. Kr. n-ro 18/19) Prof. Collinson diras: Kelkfoje mi trovas diferencon en specifaj vortoj. Kaj tiam li mencias la Biblian „dornego por la karno“, kun la angla kaj germana (kaj ankaŭ nederlanda) esprimo „dorno en la okulo“. Sed tiu lasta esprimo tute ne rilatas al tio, kion diris la apostolo Paŭlo kaj kio cetera ankaŭ havas alian signifon. Dorno en la okulo estas prenita el Nombroj 33,55, kie ni legas: „Sed se vi ne forpelos de antaŭ vi la logantojn de la lando, tiam tiuj, kiujn vi restigos el ili, estos dornoj por viaj okuloj kaj piedoj por viaj flankoj, kaj ili prenos vin en la lando en kiu vi loĝos.“

W. Kričke.

Eldonejoj

de novaj Esperanto-gramatikoj, vortaroj kaj similaj libroj prilingvaj, dezirantaj specialan kritikon pri tiuj libroj en „Lingva Kritiko“, estas petataj sendi po unu ekzemplero al la ĉefredaktoro s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

Ni atentigas speciale, ke temas ne pri recenzoj, sed pri serioza kritiko de libroj prilingvaj, do ne de verkoj beletristikaj k. sim.